

# HIS JUNED

HISPANA ESPERANTA  
JUNULARA SEKCIO

Ci. ATOCHA 98 - 4.<sup>o</sup>  
TELF. 230 87 98  
MADRID - 12  
HISPANIO

N-RO 118

marto  
1983

## ATENTU:

JEN LA PLEJ GRAVA  
DANGERO POR LA HES-  
-TENDARO !!!



### !! KROKODILO !!

SE VI RENKONTAS KROKODILON, INSTRUU AL ĜI  
ESPERANTON. SE ĜI JAM SCIAS, PAROLU NUR EN  
ESPERANTO. KAJ SE ĜI ANKORAŬ KROKODILAS,  
AŬ FORIRU, AŬ METU STANGON EN ĜIAN FAŬKON.

Kunlaborantoj: Alberto Franco, La nova spiko,  
Ana María Ranero, NE, Petro Sapiro (Super-  
HEJS), M.A. Sancho, HODUO, Liven Dek, Sidan-  
ta Taŭro, Cema Rodríguez, Luis Serrano Pé-  
rez kaj... LA KROKODILO!!!

INDEKSO

Paĝo	1	.....	Krokovrilo
"	2	.....	Indekso
"	3	.....	Leteroj al la Dir.
"	6	.....	Anonco
"	7	.....	Sentitolaj aventuroj de Petro Sapiro
"	9	.....	El la estraro (grave)
"	10	.....	Kion niaj Okuloj ne pevas vidi, KIAM GUTO PALAS EN AKVON...
"	12	.....	La plej dezirinda mor- to por la krimuloj
"	13	.....	La kaptito
"	14	.....	Cigno Ikso-1
"	16	.....	Senvestigu vin la unua!
"	18	.....	Grava informo
"	19	.....	Ĉefartikolo; redakcia noto; solvoj al la enigmaĵoj...
"	20	.....	Anonco kaj...
"	21	.....	Potoromano: Amindumaj aventuroj de Petro Sapiro

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.

# LETEROJ AL LA DIR.:

Altestimata direktoro de HEJS-Juneco:

En la decembra numero de HEJS-Juneco mi povas legi tre amuzan letereton al la direktoro, t.e. al vi. Kaŭze de la letereto mi bonvolas peti, ke vi sciigu al S-ro Georgo Kamaĉo (kiu kaŝiĝas sub la numero 2572), ke, se li volas scii, kial, laŭ nia opinio, la nomo de nia bela urbo estas Esperante "Seviljo", ke li bonvolu kontakti kun ni, ĉar certe ni scias la respondon. Profitante ĉi okazon por vin saluti, mi adiaŭas.

Ĝis!

Alberto Franco

Sekretario de SEJO

S-ro Dir. (responde la ĉi-supran leteron):

Por ke ankaŭ la legantoj de HEJS-Juneco konu la kialon skribi "Seviljo"-n anstataŭ "Sevilo", sendu alian leteron al la Direktoro por la venonta numero, kaj klarigu vian motivon. Dankon.


E-isto n-ro 50,701 + 0,408599 ×  $\frac{9}{9}$

Saluton, geamikoj!

Mi estas nova membro de HEJS, kaj antaŭ ĉio mi devas gratuli vin pro la kom<sup>2</sup>pleta, diversa kaj agrabla enhavo de via, mi diras eĉ nia revuo. Mi deziras kunlabori iomete en ĝi. Ĉi-foje mi tion faras per la artikoleto "La plej dezirinda mor

te por la krimuloj". Mi esperas, ke vi ne trovos multe da eraroj (1). Mi subskribas per la nomo: la nova spiko, ĉar, por fari la artikolon, helpis min kelkaj geamikoj.

Nenio plu ĝis nun. Mi deziras al vi ĉion bonan, kaj salutas vin amike



(1) Efektive, ni trovis malmulte da eraroj.

S-ro Direktoro,

Mi ŝatus respondi al la malkonsento de Ismael García Robledos, aperinta en la numero 117, pri la nomo de la unua muzika noto en Esperanto, kiun mi skribis en krucvortenigmo en pasinta numero.

PIV difinas "C" (paĝo 135) kiel la angla-germanan signon de la unua tono de la natura majora skalo, responde al la franca-itala "do". Kaj se vi rigardas sur la paĝo 200, vi eble vidos, ke "do" estas definitiva kiel "fundamenta noto en la itala, hispana, bulgara kaj franca, (=C)".

Do, oni povas konstati, ke ne ekzistas specifa nomo en Esperanto por nomi la muzikajn notojn, kaj eblas, ke oni elektu inter la "angla-germana" maniero aŭ la "latina".

Mi petus de iu ajn kritikanto -aŭ oĝa kritikonto- nur, ke, antaŭ ol publikigi en HEJS-Juneco ĉiujn miajn "erarojn", "hispanismojn" kaj "barbarismojn", oni rigardu unue atente la Plenan Ilustritan Vortaron. Dankon.

Ana María Ranero

4 ("Ana" skribita kun nur unu "n"; "Anna" ja estas barbarismo en la hispana lingvo).

## "ERARIGAJ TEKSTOJ POR LA KLASO"

Sinjoro Direktoro de HEJS-Juneco:

En 252-a numero de "Boletín", aperas unu el la tiel nomataj, mi ne scias kial, "Facilaj tekstoj por la klaso", kies aŭtoro estas JES.

Oni komencas legi kaj vidas en la 12-a linio: "Ĉu... mi povas eniri kaj min sidi?"

Tio ja ne estas Esperanto. "Sidi" estas netransitiva verbo, do ĝi ne povas havi rektan objekton. Oni devas uzi la verbojn "sidiĝi" aŭ "eksidi".

Rim. 1: tri liniojn sube oni povas legi: "—Sidiĝu"; mi tute ne komprenas la aŭtoron.

Poste aperas la formo "tiuĝ-ĉi", anstataŭ la korekta "tiu ĉi".

Rim. 2: en PAG, ĉapitro 54, sidas ĉi frazo: "Oni neniam ligas ĝin (ĉi) al la pronomo per streketo".

Pli sube: "Kontenta de via aĉeto", anstataŭ "kontenta pri, je, pro, per via aĉeto" (vidu en PIV sub la vorto "kontenta").

Kaj sur la sekvanta paĝo, mi legas la onomatopeon (?) "Ja, ja, ja". Kion deziris esprimi la aŭtoro? Ĉu "Certe, certe, certe" aŭ "Ha, ha, ha"?

Poste: "sinjorecaj" (parolante pri nuboj). Laŭ PIV, "sinjora" signifas "rilata al sinjoro 1 kaj 2": sinjoro 1: nobela landestro. Sinjoro 2: mastro de sklavo, dunginto de servisto. Kio estas tio? Hispanismo aŭ stranga speco de nuboj?

Kaj "kelkfoje mi vidis mian kuzinon Marta kaj sian blondan hararon", anstataŭ "ŝian" (eble tio estas nur preseraro).

Kaj sur la paĝo dudeka: "Nu, karinjo". Kio estas tio? Ĉu la hispana "carriño"? Kial uzi tiun vorton, se ni havas la esprimojn "karulo"

(kiom JES uzas kvar liniojn sube) kaj "nia kara"?

Fine, por montri kiseton li uzas la necesperantan onomatopeon "Muá". En pura Esperanto ni devus transkribi "Múa" aŭ "Mua'" (aŭ "Múa'").

Mi konsilas al tiu sinjoro JES, ke li ne verku tiajn artikolojn por la kiasoj, ĉar ili povas erarigi la komencantojn, kaj ni bezonas bonajn, ne malbonajn, esperantistojn.

NE

---

A T E N T U      I O M E T E      !

---



La Grupo de Esperanto IB "Séneca" el Kordovo informas vin ke 5 knabinoj partoprenantaj en nia Elementa Kurso deziras korespondi kun hispanaj geknaboj. Ili estas:

- M<sup>a</sup> Carmen Rojas Luque 15-jara.
- Manoli Rojas Luque 18-jara.
- María Rojas Luque 18-jara.
- Mercedes Infante Martín 17-jara.
- M<sup>a</sup> Isabel Jiménez Ruiz 17-jara.

Se vi volas korespondi kun iu, bv. adresi al:

GRUPO DE ESPERANTO - I.B. "SENECA"  
Avda. Menéndez Pidal S/N.  
CORDOBA-4

---

TEKSTO KAJ  
DESEĜNOJ:  
G. KRAMAĜO

GANDIO.  
LA 1-AN DE APRILO 1983  
ĜUSTE LA DEKA MATENE.  
ĈIO OKAZAS NORMALE  
EN LA ESPERANTO-OAĜO.

SED, TAMEN, AŬDIGAS  
STRANGAJ SONOJ...



DUME, UNU EL LA MEMBROJ  
DE HEJS, TRO KURIOZA,  
SEKVIS KELKAJN PIEDSIGNOJN,  
KIUJ KONDUKIS LIN AL LA  
ESPERANTO-OAĜO...



JEN TIO, KIO  
ALPROKSIMIĜIS AL  
LA TENDARO...!!!



HO! HA! HELP!!!  
HU!



ĈU ILI RICEVOS NENIAN  
HELPOŬ? NE, ĈAR INTER  
LA ĈEESTANTOJ TROVIGAS  
SPECIALA ESPERANTISTO...

KI-, KI-, KIO  
OKAZAS? ONI PETAS  
HELPOŬ! O-, O-, O-NI  
VIDIS KROKODILON!


MI DEVAS AGI,  
ĈAR MI ESTAS...

# SUPER-HEJS!


ĈU VI KONTROLIS  
LA TRANSFORMADON?  
SUBITE, NIA  
AMIKO PETRO  
SOPIRO (TIU DE LA  
DORMOSAKO) FARIĜIS  
SUPER-HEJS!!!

KIO OKAZOS?...  
SSSS JUUU!!

KROKODILO!  
VENU ĜI  
TIEN!





...TION VIDU VI MEM!!!



ĈESU  
KROKODILI KAJ  
LUKTU KONTRAŬ  
MI!

# KROOK



ĈI TIU ESTAS  
LA FINO!



=====

grave grave grave grave grave grave grave grave grave grav  
EL LA ESTRARO Miguel A. Sancho  
e grave grave grave grave grave grave grave grave grave gr  
=====

Mi petas de vi, estimata leganto, ke vi bonvolu atente legi ĉi-artikolon ĉar, kiel la kaptitolo anoncas, temas pri gravaj aferoj. Unue jen kelkaj burokrataj klarigoj:

- Nia banko ne informas pri nomo kaj adreso de la pagintoj. Tial ni petas, ke se vi sendas monon al nia konto, - samtempe informu letere al nia oficejo.

- Dekunu protektantoj de antaŭ unu (kaj eĉ du) jaroj protektas nenion. Ĉu temas pri morala subteno? Ni devas averti ilin, ke la nepagontoj de la kotizo por 1.983 riskas ne ricevi la venontan ĉi-revuan numeron.

- Pri la Tendaro, rimarku ke ĝi okazos DE LA 1<sup>a</sup> ĜIS - LA 4<sup>a</sup> DE APRILO 1.983, t.e., dumpaske. Ni petas pardonon ĉar pro nia kulpo aperis erara dato en kelkaj revuoj kaj - aliĝiloj.

Nun, jen la ne burokrataj aferoj (sed ne pro tio malpli gravaj):

- Baldaŭ ni pretigos la statuton por fina pridiskuto en la Tendaro. Se vi havas ideojn ne forgesu ilin porti al la aranĝo:

- Post la aprobo de la statuto oni devos denove oficiale elekti estraron. Ne antaŭvideblas grandaj ŝanĝoj sed tiuj, kiuj emos alporti ion al HEJS certe havos lokon. Pri pensu tion.


# kion NIAJ okuloj ne **Povas** VIDI KIAM GUTO

Ultrarapida fotio povis kapti jenan serion da imagoj, faritaj centonon da sekundo unu post la alia.

Kiam akvoguto fahas sur supraĵon de vieta akvo, produktas serio da fenomenoj, kiuj malobeas la leĝojn de la komuna saĝo: la guto ne falas sed estas enakviginta.

La kompleta serio de la dek kvin imagerespondas al totala daŭro de okonosekundo. Per ke oni vidu pli bone, la guto estis ruĝigita, kaj la akvo bluita.

Gis la sesa imago okazas kiel oni povus antaŭvidi: la guto falas sur la lian supraĵon kaj enligas akvon, formante tiam krateroforman onon.




# REFALAS EN AKVON...

Surprizige, en la sepa foto eliras de la kraterfundo malgranda akvokonuso, - kiu kreskas kaj maldikiĝas. La pinto rondiĝas kaj finfine dissiĝas. La ruĝa gutto revenis! Ciu likvaĵo emas konservi sian formon.

La fenomeno ripetigas, ĉar la gutto ne povas malobei la leĝojn de la gravito, kaj refalas. Ĉe ĉiu refalo, la gutto perdas energion, ĝis la akvaj kaj gutaj molekuloj posedas la saman energion, kaj ili miksiĝas. Tiam finiĝas la fenomeno.

(El "Almanaque AGROMAN 1982")



# LA PLEJ DEZIRINDA MORTO POR LA KRIMULOJ

Oni kredis multtempe, ke ĝi estas la subita morto. Tio estas eraro. Ni pruves tion.

Viro, kiu antaŭ nelonge plenumis grandajn servojn por sia patrujo, kaj pro tio li estis tre bone konsiderata de la princo, havis la malfeliĉon dum pasia momento de konfuzo murdi, pro kio li estis juĝita kaj mortkondamnita.

Petegoj por nenio taŭgis kaj oni enkarcerigis lin.

Tamen, konsiderante liajn bonajn antaŭaĵojn, la princo permesis al li elekti, kian morton li devos suferi. Sekve, la pedelo vizitis lin kaj diris:

—La princo, danko pro viaj antaŭaj servoj, volas fari al vi donacon. Li decidis, ke vi elektu, kian morton vi deziras. Rememoru nur unu aferon: li devos morti.

Nia viro respondis:

—Tiel do, eĉ bedaŭrante mian kruelan sorton, mi konfesas klare al vi, ke la morto pro maljuno estas la plej dezirinda. Mi elektas ĝin, ĉar la princo havis la bonon permesi al mi decidi.

Mvankam oni provis rezonigi lin, nenio ŝanĝis lian opinion. Ĉar la princo estis honora homo, li devis liberigi la malliberulon kaj atendi, ke la maljuno plenumu la rapertitan punon kontraŭ la kondamnito.

La nova spiko.

# LA KAPTITO

En Junin aŭ en Tapalque oni rakontas historion. Knabo malaperis post indiana sturmo; oni diris, ke lin ŝtelis la indianoj. Liaj gepatroj serĉis lin senutile. Jarojn poste, soldato, kiu venis el la interno de la lando, pamolis al ili pri indiano kun ĉielbluaj okuloj, kiu ja povus esti ilia filo.

Fine ili retrovis lin (perdiĝis la cirkonstancoj de la historio kaj mi ne volas inventi, kion mi ne scias) kaj ili kredis lin rekoni. La viro, velkigita de la dezerto kaj la barbara vivo, ne plu komprenis la vortojn de la gepatra lingvo, sed li lasis sin konduki, indiferenta kaj obeema, ĝis la domo.

Tie li haltis, eble ĉar la aliaj haltis. Li rigardis, trairis kure la vestiblon kaj la du longajn kortojn kaj eniris en la kuirrejon. Senhezite li enprofundigis la brakon en la nigriĝintan kamenkapuĉon kaj eltiris la tranĉileton kum tenilo el korno, kium li kaŝis tie, kiam infano. Liaj okuloj brilis de ĝojo kaj la gepatroj ploris, ĉar ili trovis la filon.

Aŭtoro: Jorge Luis Borges  
Traĉukis: Liven Dek

Gloso: Junin, Tapalque (Hunin', Tapalke) Argentino



HAŬ!



# CIENNO.1 IKSO.1

## LA DUBOJ PRI LA APOLO XI-a

Ciuj scias, ke la 21-an de julio 1968 la homo paŝis unufoje sur la Luno: laŭ la vortoj de la astronauto Neil Armstrong, tio estis malgranda paŝo por homo sed granda paŝo por la homaro. Sed eble vi ne scias, ke ĝis tiam granda parto el la usonaj sciencistoj kontraŭis ĉi tiun vojaĝon.

Universitata profesoro antaŭe asertis, ke la spaciala flugo devus prokrastiĝi, ĝis oni studos la ŝtonojn, kiuj alvenis el la Luno. Laŭ la opinio de ĉi tiu profesoro, se ekzistus lunaj ĝermoj, nenia kvarenteno povus eviti la infekton. Sed la solvo estis rapida, la Usona Registaro konsideris, ke tiu motivo ne estis sufiĉa por forigi la plej gravan vojaĝon de la homaro post Kristoforo Kolombo. La astronautoj demetis siajn botojn kaj gantojn en la kapsulo kaj fortega sukilo absorbus la lunan polvon.


Inverse ekzistis la danĝero infekti la Lunon per teraj ĝermoj; en la lasta tago de junio la astronautoj komencis kvarentenon, oni malpermesis la kontakton ekster iliaj familioj. La lasta konferenco okazis kun plasta muro inter la astronautoj kaj la ĵurnalistoj, kaj tiuj respondis la demandaren kun maskoj. Tamen la vojaĝo estis perfekta kaj je la kvara atm. (hispana horo) Neil Armstrong paŝis per sia maldekstra piedo sur la Luno, kaj eĉ ĉi tiu paŝo estis detale registrita.

## LA STANDARDOJ SUR LA LUNO

Unu el la problemoj, kiun NASA (Nacia Administratejo pri Spaco kaj Aeronautiko) devis solvi antaŭ la vojaĝo de la Apollo XI-a, estis, kiajn standardojn portus la astronautoj al la Luno. Unue la Usona Registaro asertis, ke al nia satelito irus tri usonaj standardoj, unu restus tie kaj la ceteraj presidus la Senaton kaj la Kambron de Reprezentantoj, kaj irus ankaŭ la kvindek standardoj de la ŝtatoj de Usono kun la standardoj el ĉiuj ŝtatoj de UN.

Tamen finfine iris nur la usona standardo, kiu restis sur la Luno. Ĝi mezuris 1'5 x 0'9 metrojn kaj, ĉar en nia satelito ne estas vento, la masto devis esti speciala, por ke la standardo teniĝu disvolvita, "escepte de la falo de meteoro", kiel diris usona komisiito. La astronauto portis al la Luno ankaŭ platon kun la subskriboj de la prezidento Niksono kaj de aliaj 50 prezidentoj kaj reĝoj de la mondo apud la sekvan-taj vortoj: "Pacom je la nomo de la homaro". Sed la usona standardo ne estis la unua sur la Luno. Du jarojn antaŭe, en februaro 1966, rusa fuzaĝo sen astronautoj lasis ruĝan standardon sur la Lunon.

Cema Rodríguez  
HEJS-delegito en Kordovo



# SENVESTIGU VIN LA UNUA!

Mi ne scias, ĉu ĉi tiu estas ja la ĝusta traduko de la kastilia vorto "excoritate". Mi jam trovis en mia ilustrita vortaro de la hispana lingvo la vorton "corito-ta", kiu signifas senvesta, nuda. Sed pri la verboformo kaj la konjugacio de tiu vorto "corito" mi nenion scias. Pri "excoritate" mi trovis nenian vivsignon. Tamen pri io mi estas certa; en la nordo de la Malnova Kastilio la vorto "excoritate" estas ofte uzata. Sed, ĉu mi devas ĝin skribi kiel "excoritate" aŭ "escoritate"? Mi esperas, ke homoj pli inteligentaj ol mi, eble iu Cela, aŭ iu Criado del Val, sciigos al mi la ĝustan skriboformon de la menciita vorto (1). La esprimo aludita rilatas al la jena rakonteto:

En la vilaĝo kastilia, kie mi naskiĝis, estis paro da gejunuloj, kiuj sincere kaj pure sin amis reciproke. La junulo amindumis sian amatinon dum kelkaj jaroj. La gepatroj de ambaŭ gejunuloj interkonsentis pri ilia geedziĝo. La birdeto kaj la birdetino diris nur "jes" kaj "dankon". Ekde tiu tago la fianĉo jam rajtis eniri en la hejmon de sia karulino kaj ili rajtis eĉ fortan manpremon okaze de la adiaŭo. Pri doto kaj heredaĵo estis nenia problemo, ili estis tute nenihavaj, kio simpligis la aferon. Siaj gepatroj zorgis pri la lito, la litotukoj kaj siaj vestoj, kio ja estis la kutimo loka. Liaj gepatroj okupiĝis pri la estonta hejmo kaj liaj vestoj.

(1) En la kastilia ekzistas la vorto "descoritar", kiu signifas "senvestigi" (vd vortaron). G.K.



Almenaŭ tiutempe la gejunuloj de la kastiliaj vilaĝoj ne estis tiom liberaj, kiom nuntempe. Efektivigi la edziniĝon virga estis unu el la plej gravaj aŭ la plej grava kondiĉo por edziniĝi. Tiu postulo estis io tre valora por la fianĉo. Oni devas diri, honore al la vero, ke tiuj kondiĉoj estis plene observataj, ne nur de la fianĉino, sed ankaŭ de la fianĉo. Ili ne sciis, kio estas ama kiso. Tia estis la vivo nuntempe. Mi opinias, ke pri tio ni iom progresis, ĉu ne?

La monatoj forflugis, kaj alvenis la geedziĝa tago. Ĉio estis en ordo. La gefianĉojn ne timigis la religiajn ceremoniojn, ĉar delonge kaj bonege ili estis preparitaj por tiel eksterordinara evento. Kokoj kaj kunikloj bone bredataj estis destinitaj por la granda tago...

Tamen estis io, kio vere maltrankviligis ilin, la momento pri enlitigo kaj cetere... cetere. Si pensis: kion mi devos fari? Li, siavice, cerbumadis: kiel mi devas komenci...? Ĉar ankoraŭ oni ne inventis ilon por haltigo de la tempo, la geedziĝa tago alvenis. La festo finiĝis kaj la ĵus geedziĝintaj vole aŭ nevole devis iri al la lito. Kia situacio!

Estas kutimo en la vilaĝoj spioni la gefianĉojn en la unua nokto de ilia geedziĝo, kaj eĉ moki ilin. Kaj tio ja okazis al nia paro. Iuj viroj, gastoj de la festo, decidis iri apud la fenestron de la geedza ĉambro. Pacience ili atendadis kaj aŭskultadis, kio okazas interne. Post mallonge la spionoj aŭdis bruon de malfermata pordo, kaj jen la fianĉoj interne de la ĉambro. Post momento oni aŭdis la jenan dialogon: senvestigu vin la unua (excoritate tú primero); ne, ŝi respondis, senvestigu vin la unua... la peto estis ripetata kelkfoje, kio multe amu-

zigis la aŭskultantojn. Eĉ unu el ili havis la privilegion iomete rigardi tra fendeto, kiu ekzistis pro malbona alĝustigo de la fenestro. La situacio interne fariĝis komika, kaj ekstere oni malfacile povis haltigi la ridon, kiu fine eksplodis kun grandaj krioj. La kompatindaj geedzoj, aŭdante tiom da bruo kaj ridoj, kaj komprenante ĝian signifon, subite, rapide, senpripense enlitiĝis kaj malŝaltis la lumigilon. Oni supozas, ke poste ili bone interkompreneĝis, kion atestas post kelkaj jaroj ilia multnombra idaro.

Se vi opinias, kara leganto, ke ĉi tio estas ŝerco de la subskribinto, vi tute eraras. La rakonto vere okazis kaj eĉ pli detale mi povas vin informi, ke ekde tiu tago ili estis konataj per la kromnomo "los exorbitates", "la senvestigintoj". Nuntempe iliaj nepoj estas konataj per la sama nomo.

Se vi estas scivolema pri la rakonteto, mi povas sciigi la nomon de tiu kastilia vilaĝo kaj tie koni la idojn de niaj "herooj".

Luis Serrano Pérez

---

### GRAVA INFORMO

Aperis nova revuo: La Kordova Esperantisto, de la Grupo de Esperanto I.B. "SENECA" de Kordova. La fakuloj epitetis ĝin jene: monumenta verkego (Kamaĉo), maksimuma kompleteco (Moleon'), senprecedenca entrepreno (Sanĉo Pardo), giganta trezoro (Büeno Sekero), epopeo (La Granda Kapitano), miraklo de precizeco (Ismael Garcia Robledos), grandioza (Petro Sapiro), treege valora volumo (Cema Rodrigeso), kvazaŭ streĉa romano (Panĉo Kolado).

# ĈEFARTIKOLO

Ci tio ja ne estas ĉefartikolo, ĉar en Esperanto ekzistas nur unu artikolo, kiu estas samtempe la ĉefa kaj la malĉefa.

LA REDAKCIO

## REDAKCIA -n-o-t-o-:

Cu vi jam rimarkis, ke ĉi tiu estas kontraŭkrokodila numero de HEJS-Juneco? Laŭ PIV "krokodili" signifas slange "Paroli nacilingve en esperantista medio". Dum la tendaro okazos kontraŭkrokodila agado; pliajn informojn vidu en la sentitolaj aventuroj de Petro Sapiro.



Solvoj al la enigmaĵoj...


4	+	3	-	2	=	5
x		+		x		
1	x	8	÷	2	=	4
-		-		+		
1	+	4	-	3	=	2
=	3	=	7	=	7	

4	+	3	-	2	=	5
x		+		x		
2	x	4	÷	2	=	4
-		-		+		
5	+	0	-	3	=	2
=	3	=	7	=	7	

T	R	O	L		K	A	K	I	A	
R	A	K	E	T	O		Ĉ	U	L	
O	K		G	E	R	M	A	N	A	
L	E	G	E	N	D	A	J		J	
O	T	E	N	R	O	K		U	N	U
	O	R	D	O		A	K	R	A	
V		M	A	K	A	R	O	N	I	O
I	N	A	J		K	O	K	O		K
S	E	N		U	R	N	O		N	U
T		A		N	A	I		N	U	L
O	L		M	U		O	K	U	L	O

### REBUSO

Kun sopira koro  
(kun so, pira koro)



ĜIS LA  
REVUO!

# ALIGU AL EŜLI!!!

ESPERANTA ŜAKLIGO INTERNACIA

- Vi partoprenos en ŝakturniroj per korespondo.
- Vi akiras bonajn letergeamikojn el la tuta mondo.
- Vi ricevos ĉiun brian monaton la EŜLI-Bultenon "Esperanta Ŝako".
- EŜLI antaŭas nuntempe 500 membrojn el 33 landoj.



NE HEZITU:

PETU PLIAN INFORMON AL LA PERANTO  
DE EŜLI EN HISPANUJO:

S-ro Miquel Marco i Gol.  
Msa. Caldes de Montbui 40

BARCELONA 32